# LETERO EL ANGLIO

La brita ĉefkomandanto en la granda buĉado 1914/18 Haig (Hejg) mortis en sia lito, kaj la registaro elspezos 7000 funtojn, por honori lian memoron per konstruo de monumento. Ŝajne ne sufiĉas la tombo de la nekonata soldato por memorigi la patrinojn pri la glora ofero de iliaj filoj. La tombo de Haig fariĝos nova ejo por la hipokrita plorado, la fanfaronado pri brita kuraĝo, brita fideleco, brita supereco kaj venkado. Ĝi helpos krei la atmosferon, en kiu malsaĝuloj nek komprenas la kaŭzon de milito, nek pensas detrui ĝin, nek antaŭvidas ĝian teruron kaj kruelecon. El la lernejoj oni alkondukos grupojn, kaj ĉe la monumento la knaboj aŭdos pri morto pro la brita patrio kiel la plej alta celo. La nunaj filmoj subtenas tiun ideologion, glorante la militon kaj helpante prepari nutraĵon por la kanonoj.

---

Ĉu paco en la industrio povas ekzisti? S-ro Alfred Mond — riĉa, lerta, hebrea, antaŭenema kapitalisto — jesas kaj invitas grupon de sindikat-gvidantoj laboristaj, diskuti kun la estroj de l' industrio. Sed dum la lango parolas pri paco, la kapitalista mano preparas la militon, kaj la salajroj de la teksistoj kaj ministoj speciale estas minacataj. La registaro ĉe la Intern. Labor-Oficejo intencas ĉesigi la klopodojn, limigi internacie la labortagon je 8 horoj laŭ la Vaŝingtona Konferenco. En la malriĉaj distriktoj ĝi tre malaltigas la subtenon por la senlaboruloj.

---

La episkopoj kaj la eklezianoj ankoraŭ bataladas pro la nova Preĝ-libro. Ĉu la brita eklezio glitos sub la kalkanon de l' Roma papo? Per granda agitado la parlamento fine rifuzis konfirmi la ŝanĝojn planitajn, kiuj plejparte permesus al la brita pastraro, imiti la ritojn de sia katolika frataro. Kredeble la parlamento akceptos kaj oficialigos kompromison. Sed la ekleziuloj komencas paroli pri memrego por ia eklezio. "La parlamento ne havu rajton decidi pri niaj aferoj."

Certe la senoficialigon de la eklezio neniu progresemulo kontraŭstarus. Sed la plej grava punkto estas ĝia senposedigo. Nuntempe ĝi ĝuas rentojn ktp. kiel oficiala institucio. Certe la episkopojn pli interesas la mono ol la moralo. Se la eklezio devus dependi de la donacoj de la kreduloj, ĝi estus tiom malriĉa kiom ĝia supozita fondinto. La eklezio eĉ ricevas profitpagojn el la karbindustrio, en kiu la laboristoj laborante malsatas.

Nu, eble la sektaj malpacoj inter la kreduloj havos bonajn rezultojn.

(488.)

# La liberpensula movado en Aŭstrio

Aŭstrio estas destinita por esti la centro de la libera penso, ĉar Aŭstrio estis dum 600 jaroj la azilo de la plej nigra reakcio. La proverbo pri la katolika Aŭstrio estis ĝusta. Dinastio, kiu precize obeis la dezirojn de Romo, kiu kiel filio de Romo praktikis la plej klerikalan politikon, donis al tiu ŝtato unikan aspekton. Kiu simpatiis al Habsburg, ankaŭ simpatiis al la eklezio. Romo kaj Habsburg, eklezio kaj imperiestro estis kuniĝintaj en ligo, kiu dum multaj jarcentoj malebligis ĉiun kontraŭan opinion en Aŭstrio. La spirito de Metternih, la plej bruta diplomato de la revoluciaj jaroj 1848—1849, regis ankaŭ post la morto de tiu ĉi viro ankoraŭ longe. Ĉiu libera esprimo pri propra opinio estis subpremata, cenzuro, polico kaj juĝistaro konstante laboregis, centoj estis enkarcerigitaj, ĉar ili pensis aliel, kiel permesis la tielnomata ŝtata prudento. Miloj da presaĵoj estis konfiskataj antaŭ ol ili venis en la manojn de liberspiritaj homoj. Sisteme estis malebligata la libereco de la opinio kaj de la volo. Kontraŭ tia fono des pli kontrastas la aŭstria liberpensula movado. Jam antaŭ 40 jaroj ekagis kuracisto Plavitz kiel heroldo de la libera penso. Li arigis la senkonfesiulojn, la malmultajn kuraĝulojn (Ligo de la senkonfesiuloj). Li batalis obstine kontraŭ kredo kaj kutimo. Depost lia apero la liberpensula movado malrapide, sed konstante progresis.

Sed ne esperite evoluis la liberpensula movado en Aŭstrio post la renverso. La nova, respublika konstitucio garantiis plenan kunven- kaj organizliberecon, kaj laŭ tio la movado povis evolui ne estante daŭre observata de la ŝtataj funkciuloj. Estas la merito de K-do Franzl, esti pleniginta la liberpensulan movadon per spirito kaj vervo. Kiel post varma pluvo la fungoj kreskas el la tero, tiel fondiĝis ĉie lokaj grupoj. Ne nur en Wien, kiu depost 1919 estas socialiste administrata, sed ankaŭ en la provincoj, kiuj estis ankoraŭ tute sub klerikala gvidado, fondiĝis unu loka grupo post la alia. Ekzistas hodiaŭ ne unu konfederacia provinco, en kiu la liberpensularo ne havas firman pozicion. Kaj oni devas atenti, ke en Tirolio kaj Vorarlberg la plej nigraj landestroj regas, ke en Karintio la reakcio gvidas la registaron, ke en Stirio la ĉionpova Rintelen regis, kiu trudis al senkonfesiaj infanoj ian konfesion, ke Supra Aŭstrio havis antaŭ nelonge prelaton Hauser kiel landan estron, kaj ke Malsupra Aŭstrio havas la karulon de la episkopoj, D-ron Buresch ĉe la pinto, ke en Burgenlando la hungaraj-klerikalaj dukoj kaj pastroj estis direktodonaj. En tiuj landoj havas firman pozicion la liberpensularo. Jen ciferaj atestoj: La liberpensula ligo de Aŭstrio nombris fine de 1926 231 lokajn grupojn kaj 93 paglokojn, do 324 fortikaĵojn, de kiuj deiras ega laboro kleriga. Inter ili estas lokaj grupoj kun 1000—1500 membroj. Malgraŭ ega elmigrado kaj laborkrizo ĉiuj grupoj pligrandiĝas. La libera penso progresas!

Tiun progreson ĉefe kaŭzas la multflanka kleriga laboro de la liberpensula ligo. Ekzemple eldonis la ligo nur dum jaro 1926 presaĵojn en eldono de po 50 000 kaj gazetojn en eldono de po 400 000 ekzempleroj, ne menciante la libro-eldonadon de la apartaj grupoj. Kleriga laboro ankaŭ estis farata en la 2500 kunvenoj, el kiuj multaj fariĝis fakte amaskunvenoj. Multon ankaŭ helpis la instruo pri vivoscio por la fortiĝo de la ligo. Kiam vidis la gepatroj, ke ni ne nur vokas per vortoj je nova vivmaniero, sed ankaŭ pruvas per agoj, ke serioze ni deziras vere etikan edukadon de la junularo, amase aliĝis tre multe da plenkreskuloj al la ligo. Nur en Wien ni instruis dum 886 instruhoroj 1661 infanojn pri etika vivoscio. —

Netaksebla rimedo de la kleriga laboro estis la fondo de liberpensula instruista laborkomuno. La liberpensemaj instruistoj siaflanke tre bone influis la kolegojn inter la instruistaro kaj la gepatrojn. Al tiu ĉi multflanka kleriga laboro ni dankas la pligrandiĝon de la membraro de la liberpensula ligo. Kaj ni ankaŭ ne forgesu kaj ne prisilentu, ke ankoraŭ pli multe da homoj fariĝis senkonfesiaj sen aliĝo al nia ligo. La relative nova liberpensula movado en Aŭstrio ankaŭ jam povas montri gravajn sukcesojn, gravaj ĉefe pro tio ke ni ja vivas en tiu Aŭstrio de la prelato Seipel, kiu ĉion de la kanceleria oficejo trans la ministerioj ĝis la distriktaj kaj komunumaj funkciularoj plenigas per sia klerikala spirito. Ekz. la kristsociala landestro de Vorarlberg D-ro Enders malpermesis la liberpensulajn kunvenojn en Feldkirch kaj Bregenz, nur pro tio ke katolikaj, fanatikigitaj junuloj estis disigintaj en Dornbirn la kunvenon de iama roma katolika pastro Krenn (vidu "S-ulo" n-o 175), per tranĉiloj kaj gumbastonoj. Sed la administra juĝejo kiel la plej supera instanco en administra vivo de la ŝtato difinis ĉi tiun malpermeson kiel neleĝa. Post tiu decido certe ne baldaŭ iu funkciularo kuraĝos malpermesi liberpensulajn kunvenojn. Alia sukceso estis la malvalidigo de decidoj de lernejaj estraroj, laŭ kiuj gepatroj estis punendaj, kiuj estis ne sendintaj siajn senkonfesiajn infanojn al religia instruo.

Sed la plej grava sukceso estis, ke en 60 kazoj la administra juĝejo faris